


SUDFRANCIA STELO



Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono

N° 138 - 3a kvaronjaro 1996 - Jarabono : 3OF

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP956-28P Montpellier

chez L. Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel

2 971 kongresanoj - 60 landoj - 186 programoj: unu lingvo

La Universala Kongreso triumfas en la Ora Prago

Boutros Ghali: "Impresas via kapablo debati sen interpretistoj".

Mesaĝo de Unesco. Prelegas la Nobelpremiito Reinhard Selten

Prezento de historia manifesto (kompleta teksto en E° kaj la franca lingvo sur paĝoj 8/9

Venontaj kongresurboj: Adelaïde (97), Montpellier (98), Berlin (99).

Mesaĝo de Sro Boutros Ghali, ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj al la UK de Prago :

"Venante el tiom da diversaj landoj, vi faras apartan impreson ĉe ni en UN por via kapablo renkontiĝi kaj konduki debatojn sen bezoni interpretistojn"



Ĝi jam estas preta la oficiala ĝlumarko de la UK de Montpellier.

Tiel ĝi aspektas kaj certe ĝiaj belaj koloroj frapis vin.

Certe vi volos reklami pri la UK kaj ne forgesos aldoni la ĝlumarkon sur viaj sendaĵoj, leteroj kaj speciale viaj jarfinaj bondeziroj al viaj ĝeamikoj enlande kaj eksterlande.

Pri la vendokondiĉoj vidu sur la paĝo 7.

Ankaŭ estas presita grandformata afiŝo pri la UK de Montpellier.

La elektita bildo reprezentas la malnovan fakultaton de medicino.

Ne forgesu aceti ĝin kaj ankaŭ donaci ĝin !

97 donos al vi plurajn eblecojn partopreni la E°-vicon, Maje en Figueres kaj Stuttgart, Julie, ĉu en Valencia, ĉu en Adelaïde, ktp... En tiu-ĉi numero vi trovos informojn pri la diversaj renkontoj. Vi jam povas buĝeti viajn abonojn por 97, vidu la liston p. 7

Bonan legadon de SFS 138 kaj ne forgesu, ke la abontarifo por 97 estas 35 F !

OPERATION - 100 NOUVEAUX ESPERANTISTES EN 2 ANS EN L.R.

Chacun sait que le Congrès Mondial d'Espéranto aura lieu à Montpellier en 1998, chacun sait également que notre région manque cruellement de jeunes espérantistes. Il est nécessaire d'intensifier nos efforts pour trouver de nouveaux espérantistes et je propose la démarche suivante :

- contacts individuels
- lors des Foires aux Associations et d'autres manifestations
- contact personnel avec Lycées, Collèges, Facultés, Ecoles de Tourisme, etc

Il faudrait que chaque personne ayant manifesté un intérêt pour l'espéranto puisse recevoir un dossier .

En accord avec la Fédération Espéranto L.R. (réunion du 28 septembre 1996), je peux me charger d'envoyer ce dossier aux adresses que vous me ferez parvenir.

Gérard Paing Les Sagnes 34390 Olargues tél. (04) 67 97 79 10

FEDERACIA KUNVENO en Béziers, sabaton la 28an de Septembro:

Ceestis: J. Hénin, L. Ensuque, J. Bony, B. Berthonneau, J. Manguine, R. Llech-Walter, C. Gérard, C. Coulomb, A. Bothorel, A. Tora, F. Terral, Ges. Authier, G. Paing, H. Olek, J.-P. Peray, R. Doury, P. Lassis. Petis senkulpigon: A. Gaussen, L. Négron, A. Rocher.

Omaĝo al la forpasintoj: S. Lentaigne k. J. Lacroisey el la grupo de Montpellier, Sro Fernandez el Perpignan, Ges. Raynaud el Alès.

Bilanco: kelkaj pliaj detaloj de la lastaj monatoj:

1. pri kongresoj
 - a) federacia en Chamborigaud. J.H. petas, ke oni helpu sur la materiala kampo kaj en la gvidado de la kunveno. Antaŭ la kongreso, demandaro estis sendita; bedaŭrinde la respondoj estis tro malmultaj.
 - b) naciaj. Grupanoj partoprenis la kongresojn de Villeurbanne (UFE) kaj de Orly (Sat-Amikaro).
 - c) internacia: Prago. Dank'al JH, AT, J. Couderc, Montpellier estis prezentita malgraŭ malagrablaj malfacilaĵoj; estis vendita la kongresa afiŝo.
 2. pri staĝoj:
 - a) de Batipaume. Propagando en "Témoignage Chrétien". Pli longa staĝo estis petata de la partoprenintoj por ĝui vizitojn de la regiono.
 - b) en Sète. Partoprenis 45. Estis organizitaj 3 kursoj gviditaj de Sro Stefan (Ĉek.), Sro Guzzi (I) kaj Sro Babin (F).
 3. pri ekzamenoj. En Batipaume fine de la staĝo: 1 (3a grado); en Montpellier fine de la kursoj: 1 (1a g); en Sète fine de la staĝo: 4 (1a, 2a g.)
 4. pri Forumoj de la Asocioj.

Béziers: pro malbona vetero ne okazis la 21an de Septembro, okazos la 5an de Oktobro.
 en Lunel: plia forumo meze de Septembro dank'al Ges. Latapy.
 en Montpellier: 8an de Septembro: 90 dosieroj disdonitaj, 4 adresoj de gejunuloj: ĉu estontaj gelernantoj?
 en Narbonne: letero de JH al W. Lutermann: neniuj respondo
 en Alès: antaŭvidita sed partopreno nuligita ĉijare.
 5. pri la bulteno SFS: 118 abonintoj, 12 forgesis pagi, 13 senpagaj.
 6. pri aliaj manifestacioj:

Béziers: fine de junio 4 grupanoj partoprenis debaton en Pézenas pri lingvoj en Eŭropo. Leteroj senditaj al la 5a kanalo, al Arte... Stipendio al bona lernantino L. Delnatte por partopreni la UKon.
 Montpellier: komence de septembro, disdono de faldfolioj al la vojaĝantoj de la linio 10 (sur strato Zamenhof, bushaltejo Zamenhof) de M. May, JB.
 Nîmes: 22an de Majo: prelego de C. Coulomb kaj G. Schlumpf ĉe la emeritoj de MGEN: malmultaj ĉeestantoj (multaj jam vojaĝis aŭ foriris) kiuj estis interesitaj. Ili faris multajn demandojn pri la lingvo, la dokumentoj, malofte pri la movado - pluraj notis la referencojn de "L'homme qui a défié Babel".

Perpignan: post la propaganda prelego de Lieve Vervoort en Universitato, 15 demandoj pri la dokumentoj; GP intencas okupiĝi pri tio (LV reiris en Belgion); li petas repagon de la kostoj de la fotokopioj kaj poŝtmarkoj: tio estas la afero de la grupo de Perpignan. JH proponas aldonon de QSJ de P. Janton, kaj JM aldonon de folio indikanta la kursojn.
 BB ricevis leteron de Sro Perez el Sabadell, kiu, kadre de Ea semajno, petis, ke li akceptu gvidi viziton de Perpignan la 9an de Oktobro. Li akceptas ĉiferoni kun A. Payré.
- Projektoj:**
1. pri la kursoj:

Béziers: 1 Vendrede - socia sidejo. 2 Vendrede: domo de asocioj. Progresantoj: lunde, socia sidejo
 Montpellier: 1 Marde k. vendrede-Escoutaire; 2 Marde -MPT G. Sand; 3 Vendrede -Escoutaire.
 Nîmes: 1&2 Lunde -Domo de Eŭropo.
 Perpignan: kursoj dank'al Sro Benazet, regule anoncitaj en la gazetoj.
 2. pri la regulaj kunvenoj:

Béziers: 12 X, 9 XI, 11 I, 8 II, 8 III, 12 IV, 10 V, 14 VI en la Domo de Asocioj.
 Montpellier: 1an merkredon de ĉiu monato, alternative en La Paillade kaj l'Escoutaire.
 Nîmes: 1an lundon de ĉiu monato en la Domo de Eŭropo.
 3. pri ago-tago en Oktobro: JH sugestas: federacia kunveno en Okt. anstataŭ Sept., manifestacio sur la strato, sendo de artikolo al gazetoj.
 4. pri la Manifesto de Prago: vidu la kompletan tekston en tiu SFS; GP proponas, ke oni sendu parton de la manifesto al la gazetoj.
 5. pri la Zamenhofa tago: 14an de Decembro en Béziers.

VIVO DE LA GRUPOJ:

BEZIERS

Somere 4 grupanoj, inter kiuj junulino, partoprenis la U.K. en Prago. Nun nova oktobro kaj novaj agadoj prezentiĝas por nia grupo

Unue : jen la datoj pri la monataj kunvenoj : 12a de oktobro, 9an de novembro je la 14a h 1/2 en Domo de Asocioj. Vi NE ricevos kunvokilon.

Due : **Zamenhof-tagon ni festos la 14an de decembro** en Domo de Asocioj. Rendevuo je la 11a h. Komuna manĝo kaj distra posttagmezo (ĝis 16h1/2-17h maksimume). Anoncu vin sufiĉe frue, por ke ni povu prepari manĝon taŭgan por ĉiuj. Prezo malalta, ĉar ni mem prizorgas la laboron. Ĉiuj estas kore invititaj kaj rajtas proponi distraĵon (skeĉon, kanton, ktp...)

PRINTEMPA STAGO : ĝi okazos fine de majo aŭ komence de junio laŭ la eblecoj de Batipaume. La partoprenintoj en la lasta staĝo dezirus, ke la staĝo daŭru 1 semajnon; ĝis nun ni ne povas certigi tion.

KURSOJ : la unua kaj duagrada kursoj okazos vendrede je la 14a 1/2 horo kaj komenciĝos la 4an de oktobro.

FORUMO DE ASOCIOJ : Antaŭvidita la 21an de Septembro, ĝi estis prokrastita ĝis la 5a de oktobro. Jean-Pierre Peray preparis belajn prospektojn. Multaj vizitantoj de nia budo interesiĝis. Post inform-kunveno, ni esperas ke kelkaj eklernos esperanton.

MONTPELLIER

FOIRO DE ASOCIOJ : Ĝi okazis la 8an de Septembro. Ses da esperantistoj deĵoris la tutan tagon de la 8a horo matene ĝis la 19a horo. 90 faldfoliojn ni disdonis (ili konsistis el 6 malsamaj faldfolioj) Multaj gejunuloj interesiĝis kaj eĉ 4 notis sian adreson sur aparta kajero por ĉeesti venontajn kursojn. Ni esperu, ke ili venos.

UNUA KUNVENO DE LA MONTPELLIERA ESPERANTO-KULTURCENTRO 09-09-96 en Ĉiesdomo l'Escoutaire de Montpellier

11 homoj ĉeestis, inter kiuj nova lemantino de Jeannine Bony, kaj Sro Mainguy-

Tiu samideano eklernis esperanton kun Vilhelmo Luttermano kaj nun provas instali sur Larzac-altebenajo ekologian kaj esperantan centron. Li venis al nia kunveno por prezenti sian projekton kaj peti helpon precipe praktikan.

Poste, ni listigis datojn de niaj venontaj monataj kunvenoj kun respondaj lokoj:

En Maison Pour Tous l'Escoutaire (Rue des Razeteurs en Montpellier) je la 18-a horo, merkredojn la 3-an de decembro, la 5-an de februaro 1997, la 7-an de majo 1997;

En Centre Social de la Caisse d'Allocations Familiales (410, Avenue de Barcelone en Montpellier La Paillade) je la 18-a horo, merkredojn la 6-an de novembro, la 8-an de januaro, la 5-an de marto, la 2-an de aprilo, la 4-an de junio.

Fine ni paroladis pri diversaj artikoloj aperintaj en MIDI LIBRE pri esperanto-kursoj, -kunvenoj kaj -kongresoj.

Sekve de tiu parolado, ni konkludis kaj ekkonsciis ke estas pli bone ne fiksi precizan programon de tiaj monataj kunvenoj, ĉar tiamaniere plimultnombraj estas la parolantoj.

PERPIGNAN

La ĝenerala kunveno de la Kultura Centro okazis la 1an de oktobro ĉe la sidejo.

Kursoj : ĉiun mardon, kursoj kun du niveloj :

de la 15a ĝis la 16a h : meza kurso; de la 16a ĝis la 17a : perfektiga kurso.

Sro Georges Joly el Liono, emerita fervojisto, vizitis nin dum la kunveno. Li proponas sin por gvidi kursojn (li posedas Ateston pri Kapableco).

Gemeliĝo kun Wakayama (Japanio) : la interŝanĝo pri vivmanieroj kaj aliaj temoj funkcias bone. La artikoloj senditaj al Wakayama estis tradukitaj en la japanan lingvon por loka gazeto.

Foiro de asocioj : ni partoprenos la 23an k 24an de novembro kun alia asocio en la "Domo de Eŭropo", ni povos prezenti kelkajn dokumentojn.

Disdonado de la "unua rendevuo" ĉe "bureau information jeunesse". La kursoj estas anoncataj tra la gazetaro.

Sidejo : ĝi estas malfermata ĉiumatene inter la 9a kaj la dekunua horoj. Prefere telefoni al : 68 34 22 18 aŭ 68 55 51 77 (horoj de manĝoj)



CETTE

POST LA SEMAJNO DE SÈTE

22a Internacia Semajno en Sète : 09-09-96 / 16-09-96

Bluan maron kaj sennuban ĉielon, brilan sunon kaj varman etoson ĝuis la partoprenintoj, ĉirkaŭ kvindek, inkluzive la ĉarman bebon Jasmin', filino de Jani kaj Jorgos, kiu estas kvar monatojn aĝa.

Ni serioze laboris dank'al Stanislas Štephan, el Ĉeĥa Respubliko, kiu gvidis la kurson por komencantoj, Marjo Guzzi, el Italio, por la duagrada kurso kaj Pierre Babin por la tria grado. Simone Bernard kaj Pierre Babin zorgis pri la ekzamenoj, kiujn trapasis tri kandidatoj por la Atesto pri lernado kaj du por la dua grado. Nia brita staĝano trapasis la du ekzamenojn en tiu-ĉi sesio. Dum nia restado, ni invitis senpage du ĉeĥajn gejunulojn kaj por la lasta tago Belgo, parolanta la nederlandan, vizitis nin. Sabaton alvenis grupo el Tuluzo, kiu restis kun ni ĝis la morgaŭa tago. Ili parolis al ni pri la alveno en Ste Foy d'Aigrefeuille de naŭ lernantoj el Ukraino, kiuj, dank'al Esperanto, libertempis en Francio, unue en Sainte Foy, due en Arrout, en la departemento Ariège. Sabaton vespere, la grupo gajigis nin per muziko kaj dancoj. Marjo Guzzi, ĉiam afabla, prezentis al ni du filmojn pri Ĝenovo, kiujn li bonvolis komenti por ni per interesaj klarigoj, multe da amo por tiu mirinda urbo, tiel viva kaj kolora, kiu entenas multajn trezorojn.

Kelkaj el ni ekskursis, aŭtobuse, ĉe la bordo de la lago Thau, en Bouzigues, por viziti muzeon pri bredado de mituloj, ostroj, fiŝoj kaj la vivo de la homoj en tiu loko, antaŭ kelkaj dekoj da jaroj. Aliaj spiris sur la kanaloj de la haveno Sète ĝis la lago de Thau.

Ni ne enuis dum nia restado kaj ni esperas renkontiĝi denove kun la gesamideanoj el ses landoj, kiuj vizitis nin ĉi-jare kaj konatiĝi kun multe da aliaj eksterlandanoj.

Raportis Jeanne Bès.

RODEZ

Post la "tago de malfermitaj pordoj" ni komencis kurson kun novaj gelernantoj. La 16an de oktobro vizitos nin juna esperantisto el Zairio (prelegvojaĝoj de UFE). Somere Ges. Legeay vizitis Irandon kaj renkontis esperantistojn tie. Ges. Hénin partoprenis la UK de Prago kaj poste pasigis 5 semajnojn en diversaj partoj de Ĉeĥio kaj Slovakio, kie ili ankaŭ renkontis esperantistojn kaj eĉ E°-grupon; ili revenis kun multaj travivaĵoj kaj lumbildoj.

ARIEGE

Malgraŭ malbela vetero, 130 personoj partoprenis la inaŭguron de la "strato de esperanto" en St Félix de Rieutort je la 21a de Septembro. Samtage kunvenis la Arjeja Rondo de E-aj studoj. "Munŝetado" regalis ĉiujn kaj "Jomo kaj la Mamutoj" rok-koncertis (eble venos pli detala raporto).

AIX en PROVENCE

Profesoro M. Duc Goninaz konfirmis, ke malgraŭ kvardeko da leteroj el tre diversaj mondpartoj, la Universitato de Provenco decidis ĉesigi la instruadon de E° kun la preteksto, ke "taŭga anstataŭanto ne estas trovebla" (M. Duc Goninaz emeritiĝis). Kompreneble ekzistas klopodoj por estontece reenkonduki tiajn kursojn sed ĝis nun nenio estas certa. Ĉiukaze "la leteroj ricevitaĵoj kontribuis al altigo de la prestiĝo de nia lingvo".

Glumarkoj kaj afiŝoj por la UK de Montpellier:

Folio de 32 glumarkoj kostas 20 F, kiam prenita ĉe la kasistino aŭ ĉe LKK-ano (adreso sur paĝo 3).

Ek de 10 folioj samtempe, speciala prezo: po 18 F por folio.

Ankaŭ eblas mendi rekte al la kasistino kun antaŭpago per banka ĉeko aŭ poŝta ĉeko (poŝtĉekkonto n° 4805 38 V Montpellier) je la nomo de "Comité du 83° Congrès Universel d'Esperanto".

La prezo kun sendkostoj estas: 1 folio: 25 F (ek de 10 folioj, po 20 F).

Afiŝoj: 1 afiŝo prenita surloke: 10 F. La prezo kun sendkostoj (en tubo) 25 F por unu.
(35 F por du; 45 F por tri)

La feuille de 32 vignettes du congrès: 20F (à partir de 10 feuilles, 18F) à retirer chez la trésorière (adresse p.3)

Envoi par la poste 25F et 20F. Chèque joint à la commande à l'ordre de "Comité du 83° Congrès Universel d'Esperanto" (chèque postal au CCP 4805-38 V Montpellier).

Affiches (prises sur place) 10 F l'une. Le prix avec envoi postal (en tube): 25 F l'une (35 F pour 2; 45 F pour 3)

UFE / UEA (97):

Preferinde petu de SFS la kompletan liston, se vi ne jam aliĝis.

UFE: aktiva membro 300 F (paro: 450 F); simpla membro 160 F; dumviva membro: 6000 F

UEA: membro kun jarlibro 120 F; kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" 310 F; membro kun la 1a parto de jarlibro 50 F; dumviva membro 7750 F;

TEJO: ĝis 30 jaroj kun revuoj "Kontakto", "Tejo tutmonde" 120 F same + revuo "Esperanto" 310 F

UK de Adelaido:

Jam finiĝis la unua periodo por la kongreskotizoj, la dua periodo estas ĝis 31/12, la tria ĝis 31/03/97.

Ne individua membro de UEA (en guldenoj): 338, poste 402 kaj 475 (4a periodo ekde la 1a de Aprilo).

Individua membro de UEA: 270, 324, 380 Kunulo, junulo, handikapulo membro de UEA: 135, 162, 190.

kunulo, junulo, handikapulo ne membro de UEA: 202, 242, 285.

UFE ankaŭ proponas du eblecojn por flugi al Adelaido: vojaĝo + 9 noktoj en hotelo apud la kongresejo kun matenmanĝo, de la 16a de julio ĝis la 28a: 12 000 F; aŭ vojaĝo + 9 noktoj en Adelaido + vizito de la lando kaj krosado, reflugo el Sidney, de la 16a de julio ĝis la 4a de aŭgusto: 23 000 F. Detaloj haveblaj.

Eŭrop-Unia E° Kongreso en Stuttgart (ankaŭ kongreso de Ufe): 16-19/05/97

ĝis 15-02-97: 330 FF (junuloj 125 F) ĝis 15-04: 385 F kaj 180 F poste: 440 F kaj 235 F

Antaŭ tiu kongreso disvolviĝos en Aalen "Esperanto Kultura festivalo" de la 10/5 ĝis la 13/5:

kotizoj: ĝis 15/02: 110 F (junuloj 55 F), ĝis 15/04: 135 F (110 F) kaj poste 220 F (165 F)

ABONOJ 1997 En francaj frankoj

Peradas por vi ESPERANTO-FRANCE 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS
Telefono 01 42 78 68 86 Telekopiilo 01 42 78 08 47

Brita Esperantisto	6 numeroj	120
Dia Regno	12 numeroj	65
El Popola Ĉinio	12 numeroj	150
Esperanto (por nemembroabonantoj UEA)	11 numeroj	200
Esperanto-Actualités (en français) pour 5 ans		200
Esperanto-dokumentoj (angle aŭ esperante)	10 numeroj	155
Eventoj (pri la Esperanto-movado)	24 numeroj	230
Eventoj aerpoŝte		270
Fonto (literatura revuo)	12 numeroj	140
Franca Esperantisto por ne aktivaj membroj de UFE	11 numeroj	200
Heroldo de esperanto (pri E. movado)	16 numeroj	180
subtena	16 numeroj	360
Heroldo de esperanto aerpoŝte	16 numeroj	215
Juna Amiko (interfermeja revuo)	4 numeroj	
unu ekzemplero		55
de 2 ĝ 9 samadrese	po	45
ekde 10 samadrese	po	30
Kontakto (por ne TEJO-membroj)	6 numeroj	120
Kulturaj Kajeroj (Grésillon)	4 numeroj	85

La Domo (Revuo de profesioj kaj servoj)	4 num	120
La Kancerkliniko (politika, kultura, ajnista)	5 numeroj	125
La Lanterno Azia	11 numeroj	?
La Ondo de esperanto (socikultura el Ruslando)	6 numeroj	85
La Skolta Mondo por infanoj	16 numeroj	30
por plenkreskuloj		90
Lingvaj Problemoj Lingvo Planado po 100 paĝ.	3 numeroj	240
Literatura Foiro	6 numeroj	170
Literaturaj numeroj de Franca Esperantisto	3 nun	105
Litova Stelo	6 numeroj	65
Monato (Internacia magazino)	12 numeroj	235
Monato aerpoŝte		270
La Jaro poŝkalendaro de Monato		31
La Jaro aerpoŝte		43
Rok' Gazet' (pri muziko)	2 num. jare	
Abono por 4 numeroj		100
Ruslanda Esperantisto	12 numeroj	75
Verda Lupeo/Fenikso (filatelio)	4 numeroj	105

Abonoj validas por la kalendara jaro krom por EL POPOLA ĈINIO, kies abono povas komenciĝi en iu ajn monato
Aboni ĝeamikojn el nepaglipovaj landoj eblas pere de U.F.E.

Dum la lasta UK de Prago estis akceptita de la Komitato de UEA kaj subskribita de multaj esperantistoj la ĉi-posta "Manifesto". Tiu manifesto direktas sin eksteren kaj ankaŭ al la individuoj de la esperantista komunumo.

Se vi konsentas kun la enhavo, sendu karton kun la jena teksto: "La subskribinto(j) deklaras sian apogon al la Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto publikigita en la 81a UK, Prago, 20-27 julio 1996 (nomo(j), subskribo(j))".

Vi ankaŭ trovas la francan tekston de la Manifesto, por viaj geamikoj, kiuj ne sciopovas esperanton sed tamen konsentas kun la enhavo. Adreso de Universala E^o-Asocio: Nieuwe Binnenweg 176 / NL-3015 BJ Rotterdam - Nederlando

MANIFESTO DE PRAGO DE LA MOVADO POR LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto,

direktas ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizoj, kaj homoj de bona volo,

deklaras nian intencon firmvole plulabori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj

invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de help-lingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuan-

coriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. Demokratio

Komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado. Ni asertas, ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegale-

con je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. Transnacia edukado

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple la lerneĵano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentigas kiel hejmo. Ni asertas ke la edukado

per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. Pedagogia efikeco

Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmasteras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeutikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj. Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. Plurlingveco

La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto. Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

5. Lingvaj rajtoj

La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, ofici-

alaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencan por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj. Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco

La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado. Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo

Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu la la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo - projekto por ebliĝi al ĉiu homo partopreni kiel inviduo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigita de ili. Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble stangas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.



Présenté et adopté pendant le congrès de Prague, le "Manifeste" qui suit est un rappel des positions du mouvement espérantiste sur le problème des langues et de la communication.

S'il recueille votre assentiment, nous vous conseillons d'envoyer une carte à UEA (Universala Esperanto Asocio) avec le texte suivant en E° :
"La subskribinto(j) deklaras sian apogon al la Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto, publikigita en la 81a UK, Prago, 20-27 Julio 1996" (le(s) soussigné(s) déclare(nt) son/leur soutien au Manifeste de Prague du mouvement pour la langue internationale Esperanto, publié pendant le 81° congrès universel de Prague, qui s'est déroulé du 20 au 27 Juillet 1996). Ajouter nom(s) et signature(s).
Adresse d'UEA : voir page précédente.

Manifeste de Prague

du mouvement pour la langue internationale Espéranto

Nous, membres du mouvement mondial pour la promotion de la langue internationale Espéranto, adressons ce manifeste à tous les gouvernements, à toutes les organisations internationales et à tous les hommes de bonne volonté, déclarons notre inébranlable attachement aux objectifs définis ci-dessous, et invitons chaque organisation et chaque individu à se joindre à nos efforts dans ce sens.

L'Espéranto, qui fut lancé en 1887 comme projet de langue auxiliaire pour la communication internationale, s'est rapidement développé pour devenir une langue vivante, riche en nuances. Depuis plus d'un siècle, l'Espéranto fonctionne comme moyen de rapprochement des hommes à travers les barrières linguistiques et culturelles, et les objectifs de ses utilisateurs n'ont rien perdu de leur importance ni de leur actualité. Ni l'utilisation au niveau mondial de quelques langues nationales, ni les avancées en matière de techniques de communication, ni même l'invention de nouvelles méthodes d'enseignement des langues ne permettront la réalisation d'un ordre linguistique juste et efficace fondé sur les principes suivants, que nous considérons comme essentiels.

1. Démocratie. Un système de communication qui privilégie toujours certains citoyens, mais exige d'autres qu'ils consentent des années d'effort pour atteindre un degré moindre de compétence, est fondamentalement anti-démocratique. Bien que l'Espéranto, comme toute langue, ne soit pas parfait, il dépasse de loin tous ses rivaux comme moyen de communication égalitaire à l'échelle mondiale.
Nous affirmons que l'inégalité linguistique entraîne une inégalité de communication à tous les niveaux, y compris au niveau international. Nous sommes un mouvement en faveur d'une communication démocratique.

2. Éducation transnationale. Toutes les langues ethniques sont liées à certaines cultures et à certaines nations. Par exemple, l'élève qui étudie l'anglais découvre aussi la culture, la géographie et les systèmes politiques des pays anglophones, principalement des États-Unis et du Royaume-Uni. L'élève qui étudie l'Espéranto découvre un monde sans frontières où il se sent chez lui dans chaque pays.
Nous affirmons que l'éducation dans une langue, quelle qu'elle soit, impose une certaine vision du monde. Nous sommes un mouvement en faveur d'une éducation transnationale.

3. Efficacité pédagogique. Seul un faible pourcentage de ceux qui étudient une langue étrangère la maîtrisent vraiment. En Espéranto, l'acquisition d'une aisance complète est possible, même en autodidacte. Diverses études ont montré que l'Espéranto est utile comme préparation à l'apprentissage d'autres langues. Il a aussi été recommandé comme élément essentiel dans des cours de sensibilisation aux langues étrangères.

Nous affirmons que la difficulté des langues ethniques présentera toujours un obstacle pour de nombreux élèves qui tireraient cependant profit de la connaissance d'une deuxième langue. Nous sommes un mouvement en faveur d'un enseignement efficace des langues.

4. Plurilinguisme. La communauté espérantophone est quasiment la seule communauté linguistique à l'échelle mondiale dont tous les membres sont, sans exception, bilingues ou plurilingues. Chacun a fait l'effort d'apprendre au moins une langue étrangère jusqu'à un niveau suffisant de communication. Dans de nombreux cas, cela conduit à la connaissance et à l'amour de plusieurs langues et, en général, à un élargissement de l'horizon personnel.
Nous affirmons que les locuteurs de toutes les langues - celles qui sont largement diffusées et celles qui le sont moins - devraient jouir d'une réelle possibilité d'apprendre une deuxième langue et de l'utiliser comme moyen de communication de haut niveau. Nous sommes un mouvement en faveur de l'octroi de cette possibilité à tous.

5. Droits linguistiques. La disparité de pouvoir entre les langues est de nature à susciter une constante insécurité linguistique, voire même l'oppression directe par la langue pour une grande partie de la population mondiale. Dans la communauté espérantophone, que leurs langues maternelles soient largement diffusées ou non, qu'elles soient officielles ou non, toutes les personnes se retrouvent sur un terrain neutre grâce à la volonté réciproque de réaliser le compromis. Un tel équilibre entre les droits linguistiques et les responsabilités constitue un point de référence pour la recherche et l'évaluation d'autres solutions à l'inégalité et aux conflits linguistiques.

Nous affirmons que les disparités importantes de pouvoir entre les langues minent les garanties - exprimées dans tant de textes internationaux - de traitement égal sans discrimination fondée sur la langue. Nous sommes un mouvement en faveur des droits linguistiques.

6. Diversité linguistique. Les gouvernements nationaux tendent à traiter la grande diversité des langues dans le monde comme un obstacle à la communication et au progrès. Dans la communauté espérantophone, cependant, la diversité linguistique est vécue comme une source permanente et indispensable d'enrichissement. Par suite, chaque langue, comme toute espèce vivante, est porteuse de valeur et donc digne de protection et de soutien.

Nous affirmons que les politiques de communication et de développement, si elles ne sont pas fondées sur le respect et le soutien de toutes les langues, condamnent à mort la majorité des langues dans le monde. Nous sommes un mouvement en faveur de la diversité linguistique.

7. Émancipation humaine. Chaque langue libère et entrave à la fois ses usagers, en leur donnant la possibilité de communiquer entre eux, mais en leur empêchant la communication avec d'autres. Élaboré comme un moyen de communication universellement accessible, l'Espéranto est un des grands projets d'émancipation humaine qui fonctionnent - un projet destiné à permettre à chaque citoyen de participer, individuellement et pleinement, à la communauté humaine, tout en étant profondément enraciné dans son identité culturelle et linguistique propre, mais non limité par celle-ci.
Nous affirmons que l'usage exclusif des langues nationales pose inévitablement des limites aux libertés d'expression, de communication et d'association. Nous sommes un mouvement en faveur de l'émancipation humaine.

estos alloga jaro pro E°-aranĝoj en internacia etoso, ne nur pro la "semajnoj" de

Agde kaj Sète, sed ankaŭ pro nia federacia kongreso kune kun aliaj Sudfrancoj kaj pro la Eùropunia kongreso (samtempe Franca kongreso) en Stuttgart. Adelaide en Australio invitis la UK (la lasta antaŭ Montpellier) kaj se vi ne povos viziti tiun mirindan sed malproksiman landon, Valencia invitas vin al internacia kongreso en Julio. Profitu tiujn internaciajn aranĝojn!

FIGUERES (Katalunio) apud la landlimo de la 1a ĝis la 4a de Majo 1997

Jam notu la datojn. La enhavo kaj aliaj detaloj estas nun diskutataj. Pliajn informojn vi trovos en la venonta numero.

AALEN (Germanio) : kultura festivalo 10-13 V

kaj STUTTGART : Eùropunia E° kongreso + kongreso de UFE (16-19 V)

Pri kotizoj vidu p. 7 ; pri detaloj kaj aliĝilo : "Franca Esperantisto" de Junio aŭ petu al SFS.

Se ne eblas al vi viziti la UK-on en 1997, jen tre interesa semajno, kiu komenciĝos per kultura festivalo, pludaŭros per junulara parlamento kaj finiĝos per la Eùrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart, en kies kadro ankaŭ okazos la kongreso de UFE. Eblas kotizi ankaŭ al nur unu el tiuj tri aranĝoj. Sed

prefere aliĝu frue, vi ŝparos multe!

Ĉu indas partopreni en ĉiuj tri aranĝoj?

Jes, nepre! Ĉe la Kultura Festivalo en Aalen kaj la Eùropa Esperanto-Kongreso povas libere partopreni ĉiuj esperantistoj (kaj kompreneble ankaŭ ne-esperantistoj). Ĉe la Junulara Parlamento povas partopreni nur junuloj ĝis 30 jaroj, sed la du plenkunsidoj de ĝi okazos publike kaj estas malfermaj por ĉiuj.

Vi povas libere elekti, ĉe kiuj aranĝoj vi volas partopreni. Indas la ĉeestado dum la tuta semajno ankaŭ por tiuj, kiuj ne povos partopreni la Junularan Parlamenton, ĉar dume vi povas ĝui la urbojn Stuttgart kaj Aalen kaj la belegan ĉirkaŭon. La lokoj situas en la regiono Ŝvabio (Schwaben), konata pro la bela pejzaĝo, la tradiciemo de la enloĝantoj, ilia stranga lingvo kaj ilia bona manĝaĵo. Plie okazos ekskursoj al Heidelberg (40 minutojn per trajno), Tübingen kaj la Nigra Arbaro

VALENCIA: 7a internacia E°-kongreso; 7a Eùropa E°-forumo; 56a Hispana kongreso (8-13 VII)

aliĝo ĝis la 1a de Majo : 4000 pesetoj, poste 6000 membro de grupo (min. 15-persona) 2000 p kaj 6000 p

La kongresanoj, krom prelegojn, debatojn, kunvenojn, ktp, havos la eblecon ĝui ĉiun aranĝon de la Foiro de Julio de Valencia, kaj de la Internacia Festivalo de Blovorkestroj kiuj koincidas kun la kongreso, kaj kio permesos ĉeesti koncertojn, kabalkadojn, teatron, tradiciajn folklorajn aranĝojn, mirindajn artfajraĵojn, ktp, la plej multon tute senpage.

Gravos inter la esperantaj aranĝoj la prezentado de la literatura grupo "Ibere Libere", kiuj estos la kerno de la kultura programo. Ne forgesinda estos la okazigo de sinprezento de akademiuloj de Esperanto, kaj akademiuloj de la Internacia Akademio de la Sciencoj de San Marino (AIS) antaŭ la publiko. Ni ĝuos prelegon pri Garcia Lorca, teatron, muzikon, folkloron en Esperanto, gustumado de giganta "Paella" (tipa valencia manĝaĵo). Kurso de Esperanto laŭ la metodo Cseh estos aliĝebla. Okazos tuttaga tipe hispana kampara festo, kun grandaj surprizoj. Tagaj kaj noktaj plonĝadoj en la agrablajn akvojn de la Mediteranea Maro ne mankos. Agrabla etoso, familia kaj amikeca, ne oficialeca, akompanos nin dum la tuta kongreso

Eblas aliĝi al la duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj, kiuj montros al ni la plej belajn mirindaĵojn de Valencia kaj tuta regiono. Du postkongresaj ekskursoj kunportos nin al Andalucia (Granada, Sevilla, Cordoba, ktp), kaj al Madrid kaj ĉirkaŭaĵoj (Toledo, Aranjuez, Escorial, Avila, ktp).

Kaj por la plej aventuremaj kongresanoj, kiuj havas fortajn kruojn, kiel tute nova (tamen la unu el la plej antikvaj) maniero turismi, eblas ankaŭ aliĝi al "Perpieda Pilgrimado tra la Vojo de Sankta Jakobo", kiu kondukos nin, post du-semajna piedirado tra antikvaj vojoj, plenaj je naturmirindaĵoj kaj gotikaj monumentoj, tra arbaroj, montaroj, kaj belegaj pejzaĝoj, laŭlonge de 255 kilometroj, al la sankta urbo de Santiago de Compostela, ĉe la norda hispana regiono Galegio, kie ĉiu partoprenanto ricevos atestilon pri finsukceso de la pilgrimado.

ADELAIDO : 82a UK (19-26 VII) pri kotizoj vidu ankaŭ p. 7

Unika kontinento

Aŭstralio estas unika — praega lando kun moderna multkultura vivostilo.

En la Suda Kontinento troviĝas unikaj arboj (eŭkaliptoj), unikaj bestoj (kangurao, koalo, ornitorinko) kaj birdoj (emuoj, kukaburo, lirovostulo).

La plej fruaj kaj multnombraj enmigrintoj de la moderna epoko estis britoj, sed la nuna loĝantaro venas el pli ol 140 landoj. Tiu multkultureco

evidentiĝas en la bunteco de manĝaĵo-vendejoj kaj restoracioj, kaj en la vigla muzika kaj arta vivo de la lando. Post periodo de malbona traktado al la indiĝena popolo, oni rekonas iliajn rajtojn kaj serĉas reakordiĝon. La riĉaj aborigenaj tradicioj en arto, muziko kaj legendoj jam influas la kultureton.



Dankon, sinjoro Nitobe

De la Simpozio Nitobe de Internaciaj Organizaĵoj, samkiel multaj samideanoj, mi posedas ekzempleron de la Nitobe-raporto al la Societo de la Nacioj (SDN) en marto 1922.

Jam delonge, mi estis turmentita pro uzo de la formulo (N.N-1) per kiu ni kalkulas, tutunue mi, la nombron de la necesaj tradukistoj en Internaciaj Organizaĵoj.

Nu! Jen, ke fragmento de tiu raporto pripensigis min. Inazô Nitobe, en la 3-a paragrafo, skribas pri la demando vicpunkte de la internacia ŝparado" kaj invokas Profesoron Pfaundler (Graz) kaj lian kalkulfornulon, tiele skribita en la raporto "(10 X 9)/22. Temas, por ekzemplo, pri retekipado de tuboj por pneŭmatika poŝto en 10 distriktoj de urbo. Tiu "(10 X 9)/2" tutcerte signifas por ni: "N-N-1)" dividita per du. Verdire, estas tiu "dividita per du", kiu atentigis min. Kaj mi demandis min; "Kial?". Mi eziiris scii la tutan veron pri tiu afero. Mi, do, strekis unu post la alia, la necesajn tubliniojn... kaj mi kalkulis 45!: (10 X 9 / 2 t.e. 90 dividita per du. Kial?

Tutsimple ĉar la poerekzempla tubo estos dudirekten uzita: unu direkto per la sendado kaj inverse por la ricevo. Povas esti, ke, praktike, temas pri duobla paralela tubo pro ĉiu linio, samkiel por fervojo kaj metroo. La rezonado tamen valoras: tradukisto dudirekten laboras, altraduken kaj detraduken.

Poste, Sinjoro Nitobe, kompare indikas, ke tiu sistemo povas esti anstataŭigita per alia, kreante centran kaj unikan distriktofiĉojon (nia Esperanto-pontlingvo), tial 10 tuboj sufiĉos. Depeŝo estas sendita de distriktofiĉejo al centra oficejo, kiu, siavice, transsendas la depeŝon al la koncernita distriktofiĉejo.

Dek distriktofiĉoj + centra oficejo = dek tuboj anstataŭ 45.

Dek naciaj lingvoj + esperanto-pontlingvo = 10 tradukistoj anstataŭ 45.

Laŭ mi, Nitobe kaj Pfaundler pravas. Ni nepre devas duone dividi la nombrojn, kiujn ni uzis ĝis nun. Siatempe, mi provis klarigi la problemon fare de kleraj amikoj, sed ili ne plene sekvis min. Por 11 lingvoj, ili kalkulis, kaj kalkulas, 22 tradukistojn, kiam mi kalkulas nur 11 (unu altraduko + 10 detraduko). Eble mi malpravas. Eble Nitobe malpravas sekvi Profesoron Pfaundler kaj lian rezonadon. Tiam demonstrado nepras, ĉar ne sufiĉas aserti: "estas tiel kaj ne alie". Sed se Nitobe pravas, kvankam li elmondigis jam de 63 jaroj, tiam ni povos danki lin. Dankegi lin por palpigi al ni la realecon.

Por ke ni uzu ekzaktajn nombrojn anstataŭ falsajn per kiu, iam, oni povus akuzi nin memvole ŝveligi ilin por altrudi nian aferon. Des pli, ke, eĉ duonigitaj tiuj nombroj ankoraŭ estas konvinkindaj.

Raymond Boré

Adelajdo

La ĉefurbo de Sud-Aŭstralio situas nur 7 kilometrojn for de belaj plaĝoj. La urbocentro estis planita de avangarda termezuristo, Kolonelo Light (lajt). Dank' al li, la urbo, kiu troviĝas apud la rivero Torrens (torenz), havas larĝajn rektajn stratojn kaj estas ĉirkaŭata de verda parkzono. Dua bela verda zono, de pli natura arbaro, situas sur la flanko de la montetaro oriente de la urbo. La ĉirkaŭurboj disvolvigis norden kaj suden inter la paralelaj marbordo kaj montetaro. La nuna loĝantaro estas proksimume unu milionoj.

Modernaj arkitekturajoj staras apud la brunŝtonaj domoj kaj hoteloj kun fera ornamaĵo sur iliaj verandoj, kaj klasikaj publikaj konstruaĵoj de la pasinta jarcento.

En la centro de teatroj kaj koncertejoj okazas ĉiun duan jaron la mondkonata Festivalo de la Artoj. Tre proksime, apud la rivero kaj parko, estas la bone ekipita konferencejo kie kunvenos la 82-a Universala Kongreso de Esperanto. Samstrate troviĝas muzeoj, vetludejo, universitato, la botanika ĝardeno kaj diversgradaj hoteloj. Senpaga buso, taŭga porulseĝuloj, ĉirkaŭiras la urbocentron laŭ tiu strato kaj al la bazaroj kaj al la aborigena artmuzeo. Proksime estas la ĉefa loko por butikumado kaj multaj restoracioj; kelkaj provizas specialajn aŭstraliajn manĝaĵojn.

Unika regiono

Adelajdo estas tre bona loko por vidi la unikajn pejzaĝon, flaron kaj faŭnon de Aŭstralio.

En la zoologiaj ĝardenoj en la urbo kaj en la bestprotektejo Cleland en la montetaro eblas vidi indiĝenajn bestojn kaj birdojn.

En la urbo troviĝas multaj vizitindaj konstruaĵoj kiuj respegulas la historion de la ŝtato kaj la diversecon de ties kulturo, ekzemple Tandanya. Nacia Aborigena Kultura Instituto, kun muzeo, artgalerio kaj laborejo de metiaĵoj. La ŝtata muzeo havas gravan kolekton de novgvineaj kaj aŭstraliaj aborigenaj artaĵoj, kaj en la artgalerio eblas vidi la evoluon de aŭstralia pentrarto.

Dum tuttaga ekskurso oni povas atingi Kanguru-insulon, kiu estas paradizo por fotistoj pro siaj grandiozaj pejzaĝoj kaj sia faŭno. ekz. maloftaj marleonoj. Aŭ oni povas viziti la valon Barossa. faman pro siaj vinoj. Aŭ vagi tra la suda vinregiono al la enfluejo de la rivero Murray por vidi pelikanojn kaj muzeon pri balenoj. Aŭ tranokti en la seka Mallee-regiono por vidi noktobestojn.



La mondo sen naciaj antaŭjuĝoj

La pligrandiĝo de senlaboreco

En Sankta Peterburgo (Rusio) 240 membroj de SAT (Sen-nacieca Asocio Tutmonda) -asocio de esperantistaj laboristoj- sukcesigis sian 69-an internacian kongreson, kies devizo estis "La mondo sen bariloj de la naciaj antaŭjuĝoj".

La fina deklaro i.a. konstatis atakojn kontraŭ la vivkondiĉoj de la laboristaro, pligrandiĝon de senlaboreco kaj detruado de naturaj riĉaĵoj. La dokumento atentigas pri la altrudo de ultraliberala kapitalismo kaj malsolidaro.

Kontraŭ la etna purigado

Krome, la kongresa deklaro kondamnas la koncepton de "etna purigado" kiel instigon al krimo, petas justan pacon en Palestino, Ĉeĉenio, Norda Irlando, ktp, kondamnas la embarĝon kontraŭ Kubo, Irako kaj aliaj landoj, petas la tribunalan juĝadon de milit-krimuloj, emfazas la rolon de racio kaj toleremo super dogmoj kaj fanatismoj.

Post invito al la laboristoj kaj maldekstruloj kontraŭstari ĉiujn naciismajn, rasismajn kaj ŝovinismajn fortojn, la deklaro substrekas la rolon de Esperanto por superi la naciajn barilojn kaj alvokas al subteno de la laboro de SAT.

POUR LUTTER CONTRE LA MALNUTRITION
POUR UN ENFANT, POUR UN AN, CELA COÛTE
10 USD

("TIME" - 26.11.1990 - page 15)

POUR TRADUIRE 27 MOTS D'UN DOCUMENT
DANS L'UNION EUROPÉENNE, CELA COÛTE
10 USD

("SENNACIECA REVUO" - août/sept.1996 - pages 1 à 7)

ET IL SE TRADUIT, LÀ, EN MOYENNE
TROIS MILLIONS SIX CENTS MILLE MOTS
PAR JOUR

("LE DEFI DES LANGUES" - L'Harmattan - Paris - page: 39)

L'Union Européenne a besoin
d'une langue commune, telle
L'ESPÉRANTO,
non pas d'une langue unique

Supre : karto kun pensigaj argumentoj
kaj glumarko uzitaj de Raymond Boré.
Imitinde !

Kompil' Volumo 2 de Vinilkosmo

Post longega strebado kaj multaj problemoj (permesoj de disk-eldonejoj, perdoj de mastrobendoj en la poŝto, fuŝoj diversaj, prokrastoj, ktp) ĝi finfine aperis dank'al la helpo de ĉiuj muzikgrupoj, de la antaŭaĉetintoj kaj pluraj financaj helpoj. Ne sufiĉas produkti, poste necesas vendi. Do, helpu al Eurokka ĉe Floréal Martorell 31450 Donneville (Tel/Faks : 05 61 81 95 65) mendante la novan kompil'. KD (kompakta disko) kostas 120 F, KS (kasedo) 70 F ; aldoniĝas la sendkostoj. Samaj kondiĉoj validas por la unua volumo. Se vi pripensas jarfinajn donacojn... Ĉar SFS ne povas aŭdigi al vi la kompil', ĝi tamen proponas al vi la tekston de unu el la muzikaĵoj "Ali Bensali". Kiel por ĉiuj komponaĵoj, klarigoj en diversaj lingvoj akompanas. Bonan sukceson al la kompil' ! Gratulojn al Flo !



ALI BENSALI 2'29"

Mi estas Ali
Ali Bensali
Mia familio
Migris el Mali'
Suburba loĝejo
Ne la luksa plejo
por gepatroj kun
Sep gefiloj nun
Forpasas junag'
En tiu ĉi kag'
Je l' deka etaĝ'
Kun grava damaĝ'
Por eskapi nun
Cu la drogofum'
Sufiĉas ne plu
Enspiro de glu'
Nun dum la somer'
Pli gravas sufer'
De la malesper'
Soleco-danĝer'

Forpasas junag'
En tiu-ĉi kag'
Neniam la plag'
Neniam la nag'

Jus post jar-dudek'
Reiris Sadek'
Al naskig-vilag'
Tro bela mirag'

Sed sur lia kart'
Ploras plendfata'
Pro fremda sent' al
Tiea vivart'

Forpasis junag'
En tiu ĉi kag'
Fuŝa viv' malsag'
Por fino: kurag'

Aŭtoro: Marcelo Redoulez
Muziko: (Jo'lo) Jean Marc Ledeucq (Evo-Rosemary's Babies)
Kanto: akusaka gitaro, kanto
Seb' Sebastian' Vidas basgitaro
Pierre Bertrand gitaro
Jerome Manceo drumoj
Sopranos: Jean Louis Parre
Surbendigita vive en M.J.C. Soupetard, Toulouse (FR) de Studio Stansy.

Francis: La famille d'Ali a émigré du Mali dans un HLM de banlieue il y a 20 ans. Ali gâche sa jeunesse dans cet immeuble de 10 étages de ce quartier-ghetto sans la possibilité de connaître autre chose.


English: Ali's family migrated from Mali twenty years ago and now lives in suburban housing. Ali has ruined his youth in the ten-story apartment block in a ghetto-like neighborhood without the possibility of knowing anything else.

Español: La familia de Ali Bensali emigró de Mali a un piso suburbano hace 20 años. Ali echó a perder su juventud en una casucha de 10 pisos de este barrio-ghetto sin la posibilidad de conocer otra cosa.

Deutsch: Die familie von Ali kam vor zwanzig Jahren aus Mali in eine Wohnung in den Vorstädten. Ali verlor seine Jugend in einem zehnstöckigen Miesenhochhaus in einem ghetto-viertel, ohne die Möglichkeit etwas anderes kennenzulernen.

Jarlibro de UEA kaj "Pasporta Servo":

La esperantistaro fieras pri tiuj du servoj kaj kutime citas ilian ekziston por propagandi. Pro nova sistemo (la delegitoj devis rekandidatiĝi kaj kelkaj forgesis aŭ rezignis), la nombro malkreskis de 2166 en 87 landoj en 95 ĝis 1830 en 88 landoj en 96. Espereble la nombro denove superos 2000 venontan jaron. En nia federacio, ni klopodos, por ke estu minimume unu delegito en ĉiu departemento. En Francio estas entute 137 delegitoj (166 en 95), en Brazilo 184 kaj en Germanio 199. La nova "pasporta servo" aperis en pli praktika formato (poŝformato). Pro ĝisdatigo de la adresoj, la nombro ankaŭ malkreskis : 784 adresoj en 68 landoj. Temas pri listo de esperantistoj, kiuj pretas senpage hejme gastigi aliajn esperantistojn. Tiu servo estas bonega reklamo ĉe gejunuloj. Vidu ekzemple la mapojn de Britio kaj Germanio kun la nomoj de urboj, kie estas registritaj "gastigantoj". Vi ne bezonas luksan domon; vi-mem indikas viajn kondiĉojn, ekzemple "nur tranokto por 1 gasto" aŭ "kunportu dormsakon kaj aermatracon", "skriba anticipa peto", ktp. Tiel estos klare. En nia federacio estas nur kvar adresoj. Certe niaj gesamideanoj estas pli akceptemaj ol tiu cifero indikas, kaj certe junaj esperantistoj ŝatus trovi pli da adresoj. Se vi volas kuragiĝi junajn esperantistojn, konsideru la eblecon fariĝi "gastiganta familio" plej malfrue ĝis la 1a de oktobro 97, limdato por la venonta eldono de PS, havebla ekde Kristnasko 1997. Anticipan dankon !



LIBRO: "Les langages de l'humanité" (enciklopedio de la 3000 lingvoj parolataj en la mondo), aŭtoro Michel Malherbe, kolekto "Bouquins", eldonisto: Robert Laffont; prezo: 200 f; 1760 p. Jen dika kaj serioza libro pri temo, kiu koncer nas esperantistojn. Se vi devas de tempo al tempo paroli pri esperanto kaj prezenti ĝin al ekstera publiko, ĝi instruos vin pri la elementoj de lingvo, la diversaj lingvofamilioj, la vivo kaj morto de lingvoj, la estonteco de lingvoj, ktp. En la dua parto de la libro estas detalitaj la sistemoj de 171 lingvoj el diversaj familioj, inter kiuj esperanto (9-paĝe). La analizo de la aŭtoro eble ne plaĉos al ĉiuj esperantistoj. Li asertas, ke E° estas ĉefe uzata en esperantistaj medioj, kaj ke oni malofte bezonas komuniki kun pluraj naciecoj samtempe.

Ainsi l'espéranto a tout d'une véritable langue, susceptible d'exprimer autant qu'une autre toutes les nuances de la pensée. La souplesse de l'ordre des mots permet même des effets que certains qualifient de poétiques. Cependant, la seule question importante est celle de l'utilité et du rayonnement de cette langue. Si l'espéranto ne veut pas être une langue de plus, s'ajoutant aux 3000 autres parlées sur la planète, et qui plus est artificielle, il lui faut atteindre son ambition: être la langue des relations internationales, au-dessus des susceptibilités particularistes, et devenir dans une large mesure, la seconde langue de tout homme ou femme cultivé (e).

ESPÉRANTO 811

Les espérantistes ne relâchent pas leurs efforts en ce sens. Conscients du manque d'assise culturelle de leur langue, ils ont multiplié les traductions en espéranto, les grandes œuvres littéraires, les publications de dictionnaires bilingues, la création d'instituts d'enseignement, les émissions de radio, l'organisation de congrès etc. Des succès sont déjà acquis: on peut apprendre l'espéranto dans plus de 150 établissements (quatre universités françaises délivrent un D.E.U.G. et une licence d'espéranto), et les congrès du mouvement regroupent régulièrement plus de 6000 participants de plus de 70 pays. Ce sont la Chine, les Etats-Unis, la Pologne, Zamenhof, créateur de l'espéranto, et la Russie qui sont en tête de cet effort. Une station de Radio Pékin émet deux heures par jour en espéranto. L'O.N.U., l'U.N.E.S.C.O., l'Organisation Mondiale de la Santé éditent leurs publications de grande diffusion en espéranto. L'espéranto n'a pas encore remporté de succès décisif propre à assurer son avenir: l'Europe préfère supporter le coût exorbitant de traductions dans les dix langues officielles de la Communauté plutôt que de passer le pas et devenir espérantiste.

Peut-être y a-t-il dans le principe même de l'espéranto une analyse insuffisante des besoins de communication: rares sont les cas où l'on doit exprimer simultanément avec des gens qui parlent un grand nombre de langues différentes. Les rapports commerciaux sont plus souvent bilatéraux et chacun préfère apprendre la langue de l'autre, utilisable aussi dans le langage courant, plutôt qu'une langue artificielle théoriquement plus universelle. En fait, le seuil critique de diffusion de l'espéranto n'est pas encore atteint, et ce n'est que très exceptionnellement que l'on peut employer l'espéranto, en dehors des cercles spécialisés.

Pour le moment et pour longtemps encore semble-t-il, l'espéranto reste confiné dans le milieu de ses enthousiastes adeptes. Peut-être existe-t-il quelques millions ou plus d'espérantistes, mais ils pratiquent leur langue davantage pour leur plaisir ou dans leurs congrès, que dans la vie courante.

AFRIKA AGADO:

Philippe Chavignon (M.F. du Plan 06470 Guillaumes) proponas al vi kovertojn (kun informoj pri E° sur la dorsa flanko) kiel ĉi-dekstre.

20% de la vendoprezo konsistas el subteno al afrika movado.

65 kovertoj = 37 F; 130 k. = 70 F kaj 550 = 240 F.

Li ankaŭ proponas la libron:

"Fratoj eble ni estas -paroloj de la Ĉefo Seattle" 36 F + 5 F sendkostoj, "la viro kiu plantis arbojn" de Ĝiono kun la samaj kondiĉoj kaj "L'E°, une langue auxiliaire pour la foi Bahaie" en la franca, la angla, la hispana, la germana (10 F + 5 F sendkostoj)

UK en PERPIGNAN?

Post anonco en "Midi Libre", ke UK okazos en Montpellier en 96, "Heroldo" anoncis UK en 98 en... Perpignan!

Post reĝustigo, restas tamen eraro, temas pri la 83a UK, ĉar la 82a okazos ... en Aŭstralio. "Heroldo", kion vi heroldas?

Lastminute:

< La 52a Sat-Amikara kongreso kun infana kongreso estiĝos en urbo Limoges (Haute Vienne) la 29an, 30an kaj 31an de Marto 1997. La kongreso okazos en kvartalo Beaubreuil, norde de la urbo. Jam la 28an vespere Ges. Robineau prezentos sian tutmondan vojaĝon, kiu okazis helpe de E°. La prelego estos franclingva (por la ekstera publiko). La 29an estos vizitoj de Oradour kaj Limoges, la 31an okazos 3 tuttagaj ekskursoj. Dumkongrese ankaŭ ekspozicioj, diversstemaj debatoj, varietea kaj kultura vespero, ktp.

Informas Isabelle Jacob, Pomarbo, 87200 Saint Brice Tel 05.55.03.54.76.

< Dimanĉon la 15an de Decembro okazos la 18a Zamenhofa Tago en Avignon (La Souvine).



André Gente prelegos pri "Valo (1900-1996), la persono kaj lia verkaro".

Informas Espéranto-Vaucluse- Centre culturel La Charité, BP 113, 84024 Carpentras Cedex.

★ ESPERANTO ★

Hors de l'unité, la planète TERRE est condamnée
la terre n'est qu'un seul pays

Commençons par apprendre la langue UNIVERSELLE

FACILE: Etude 5 à 10 fois plus rapide que pour les langues européennes.
NEUTRE: Une deuxième langue pour tous qui n'appartient à personne.
EXPRESSIVE: L'Espéranto n'est pas du tout une langue uniforme, une langue robot, mais au contraire une langue naturelle et souple. L'Espéranto est en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment." M. Genevoix de l'Académie Française.

- Recommandé par l'UNESCO à ses états membres.
- Utilisé sur 23 radios de 13 pays.
- Enseigné dans 151 universités de 23 pays.
- Langue logique sans exceptions: Espéranto: 12 conjugaisons Français: 2250 conjugaisons
Espéranto: 28 lettres = 28 sons Anglais: 5 voyelles = 15 sons

LA LANGUE DE L'AMITÉ

65 env. : 37 francs	} CHAVIGNON Ph. M.F. du Plan 06470 GUILLAUMES
130 env. : 70 francs	
550 env. : 240 francs	


20% de la vendoprezo konsistas *Papier Recyclé* el subteno al afrika movado.

Renseignements : MINITEL 3615 ESPERANTO
- Union Française pour l'Espéranto - 4bis Rue de la Censale - 75004 PARIS
- Sennacasa Asocio Tutmonda - 67 Av. Gambetta - 75020 PARIS
- Groupe d'action pour l'Espéranto - 123, rue de Royan - 16710 SAINT-YRIEIX
- Belga Esperanto Asocio - 21 Rue Brabant - 1170 BRUXELLES
- Svisa Esperanto Societo - Zumholzstrasse 22 - 6010 KRIENS
- Kebekia-Esperanto-Asocio, 6358 A Rue de Bordeaux, MONTREAL

82-a Universala Kongreso.
La Universala Kongreso okazos en Francio, en la urbo Montpellier kaj ne en Perpignan, kiel anoncote pasintnumere.

X

DISTRA PAĜO KRUVOJTO



HORIZONTALE

- I) Alia somerfino en Francio.
- II) Anstataŭot(a).
- III) Aroma gum(o) / Molusk(o).
- IV) Kre(i) / Fabelul(o), tamen reala !
- V) Ark(o) / Tro ofte : sangsoiful(o)...
- VI) Vesta ornamaf(o) / Helpon oni postulas !
- VII) Senhomig(i) / Viv(o) antaŭ vivo...
- VIII) Drog(o) / Kapokapo.
- IX) Rekompenc(i) / Montana best(o).
- X) Kara Ann(a) ! / Pardonem(o).

s : sone

VERTIKALE

- 1) Kun lumo en mallumo.
- 2) Eduk(i).
- 3) Azia biblio.
- 4) Partikl(o) sen ordo / Saĝiga baston(o)...
- 5) Pridrinkita tost(o) ! / Kompletigu la duan, por ke ĝi veturu !
- 6) s : Virnomo / s : Frukto / Vin(o) en skubotelo !
- 7) Trabet(o) / Radike duobla en rolo...
- 8) Fama afrika dio / Liter(o).
- 9) Skola verkist(o).
- 10) "Arbarul(o)", arbarana kuz(o).

Solvoj de la 137a:

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	K	O	N	T	R	A	M	A	R	K
II	O	R	I	G	I	N	A	L		O
III	N	I	L		T	A	J	F	V	U
IV	T	G		A	M	S		A	R	T
V	R	I	S	K		T	U	B	E	R
VI	A	N	A	L	F	A	B	E	T	O
VII	M	A	R		E	T		T	E	L
VIII	A	L	K	E	M	I	L		R	I
IX	R		O	R	A	K	O	L		S
X	K	O	M	P	L	O	T	I	N	T



Logikoenigmo

Por solvi la enigmon vi bezonas nur kraĵojn kaj iom da koncentriĝo. Unue legu la tekston de la enigmo. Se vi nun kreas ĉiujn informojn, kiuj la teksto enhavas, vi alproksimiĝos al la solvo paŝo post paŝo. Metu "+" por certa "jes" kaj "x" por certa "ne". La solvo estiĝos tute logika. Sukceson !

Ĥaoso antaŭ la geedziĝoaltaro

Li fariĝas kun la tempo maljuna, la bonkora pastro Pastorius, kiu pasintdmanĉe geedzigis plurajn paroĵn je la sama tempo. Kun la malĝustaj okulvitroj sur la nazo li nur kun peno sukcesis deĉifri la familiajn kaj voknomojn de la paroĵ kaj ankaŭ kunigi la ĝustajn virojn kun la ĝustaj inoj, ĉu vi kapablas pere de la subaj informoj pli bone ol pastro Pastorius.

1. Suzano, la fianĉino de Wladimir, ĉiam volis edziniĝi en blanka edziĝa vesto.
2. Alessandro del Piero kaj sinjorino Schiffer, kiu fianĉiĝis al Hansi, tre surpriziĝas, ke pastro Pastorius nomas la junedzinon de Dieter foje kun Karoline kaj foje kun Hellas ĉar nek la voknomo nek la familia nomo akordiĝas al tiu de la junedzino de Dieter.
3. Pastro Pastorius facile rimarkus kun la ĝustaj okulvitroj, ke sinjorino Hellas edziniĝas al iu, kies voknomo vicas en la alfabeto malantaŭ tiu de sinjoro Castro, kiu siavice ne volas edziĝi al sinjorino Bieder.
4. Se oni permesus al pastro Pastorjus, nun Sandra Krause estus la edzino de Dieter. Sed dank al Dio, tio ne okazis!
5. Sinjoro Kraus, kiu ne nomiĝas Dieter, konvinkas la pastron, ke Barbara, kiu ne nomiĝas Hellas, estas la sola ino, al kiu li volas edziĝi.
6. Sinjoro Šmico edziĝis al sinjorino Flach, kiu estas la amikino de Kunigunde.

	Castro	Kraus	del Piero	Šmico	Lindner	Barbara	Karoline	Kunigunde	Sandra	Suzano	Bieder	Flach	Krause	Schiffer	Hellas
Hansi															
Dieter															
Jürgen															
Alessandro															
Wladimir															
Bieder															
Flach															
Krause															
Schiffer															
Hellas															
Barbara															
Karoline															
Kunigunde															
Sandra															
Suzano															



-logikoenigmo-

EJ / "Koncize 4/1996"

SERVOJ

-Mi aŭdis, ke forbrulis via somerdometo.
Ĉu vere ?
-Pst ! Ankoraŭ ne, nur la sekvan sabaton !
○○○○○
-Ĉu vi havas gramofonon ?
-Jes, eĉ stereofonian ! Mi loĝas kun mia edzino kaj bopatrino !
○○○○○
Malpacienca gasto en restoracio alvokigas la estron.
-Mi petas vin, bonvolu esplori, ĉu ankoraŭ servas ĉe vi la kelnero, ĉe kiu mi mendis tagmanĝon.
○○○○○

Bonvolu noti :
La venonta numero de "Sudfrancia Stelo"
aperos fine de januaro 1997.
Viaj kontribuoj
estos atendataj ĝis la 6a de januaro 1997.
Anticipan dankon !
SFS : ĉe Jean Hénin Beauregard
Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue
Tel/faksilo : 04 66 32 86 36